Estrara propono:

Afrika IJK – strategia celo de TEJO

Kreskanta juna movado

Dum la pasintaj jaroj observeblis ĝojiga kresko de organizaj aktivecoj en la juna afrika E-movado. Pluraj organizoj petis aliĝon al TEJO kiel landaj sekcioj:

La Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI) en 2008 okazigis sian internacian konferencon en Benino.

Jam de pluraj jaroj estas regule initiatoj kiuj alvokas al organizado de la IJK en Afriko: unuflanke el Afrikaj landoj kaj landaj sekcioj mem, aliflanke de eksterafrikaj organizoj kaj individuoj kiuj bedaŭras la ĝisnunan neglekton de tuta kontitento en la disdono de la IJK.

Alstrebinda celo: IJK en Afriko

IJK en Afriko estas alstrebinda celo por TEJO el pluraj vidpunktoj:

- Ĝi estus koronigo de la sinorganizaj penoj de la afrika movado kaj estus fieriga simbolo por la tuta kontinento
- Ĝi havus multajn aldonajn kromefikojn: Aktivula trejnado, organiza trejnado, (proprainitiata) starigo de strukturoj
- Grandskala kreado de instituciaj kaj personaj rilatoj
- Ĝi estus pruvo kaj simbolo de la internacia karaktero de TEJO

Multaj obstaktloj

Tamen, pripensoj organizi IJK-n en Afriko alfrontas plurajn obstaklojn, i.a.:

- Movado en la kongreslando
- Malfacilaĵo flanke de TEJO
  - malbona kono de funkcio kaj strukturo de la afrika movado
  - malbona kono de politikaj, ekonomiaj kondiĉoj
  - limigita kapableco racie prijuĝi eventualajn proponojn
- Taŭgaj kondiĉoj en la kongreslando
  - politike/sekurece
  - atingebleco
- Taŭga kongresloko
  - urbo
  - infrastrukturo
- Financado
  - Necesus grandskala subvenciado de en-afrikaj vojaĝoj kaj partoprenoj
  - Ankaŭ ekstereŭropa partopreno bezonus subvenciadon
- Praktika organizado

- transdono de kompetentoj al LKK
- enplekto de kernaj elementoj de IJKoj

La tuto de tiuj obstakloj praktike malebligas ke proponata afrika IJK ene de mezlonga periodo en ordinara IJK-konkurso ne venkus kontraŭ la konkurenco. Foje supozata „kontraŭafrikismo“ en tia prijuĝo ludas nenian rolon. Aldoniĝas troigitaj atendoj en Eŭropo kaj Afriko pri la efikoj de Afrika IJK

Propono: Komisiono „Afrika IJK“

Por atingi la celon „IJK en Afriko“, konsekvence bezonatus longa kaj intensa esploro k sondado, antaŭpreparado kaj preparado.

Estas proponata ke:

1. La komitato de TEJO deklaru ke „Afrika IJK estas strategia celo de TEJO, pro subteno de la Afrika movado, la alproksimigo de movaderoj k individuoj, la simbola valoro en k ester la movado“
2. Por tiu celo estu komisiono en kiu membros
   - Junaj aktivuloj k spertaj gvidantoj el Afriko
   - Eksterafrikaj spertuloj pri Afriko
   - TEJO-estrarano(j) pri IJK kaj/aŭ landa agado
   - specialisto pri financado/subvenciakirado

Tiu komisiono laboru laŭ plurnivela procedo:

a) Sondado pri eventualaj kongreslandoj kaj lokoj, konsiderante ĉiujn necesajn aspektojn

b) Instigi preparajn aktivecojn: aktivulan trejnadon k.s.

c) Sondi pri monfontoj subtenaj al la projekto

d) Starigo de internacia teamo

e) prezenti proponon.

Se la komisiono ĝis oktobro 201x sukcesas starigi promesoplenan proponon, la Estraro ne alvokas al kandidatiĝo por IJK 201(x+2), sed decidas favore al la propono de la komisiono.

Starigo de la komisiono

La Komitato taskigas la Estraron starigi la komisionon.